# Morfologio kaj sintakso de Esperanto. Paĝo 5 (24.09.2010)

## 24.5. Grado kaj kvanto (PMEG. Mallongigita)

http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/kvantaj_vortoj/grado_kvanto.html

Grado kaj kvanto estas malsamaj aferoj, sed iafoje ili proksimiĝas.

### *Tre* kaj *multe*

- *tre* = “en alta grado, kun forta intenso”
- *multe* = “en granda kvanto, kun longa daŭro, ofte ripetite”

Ĉe A-vortoj kaj E-vortoj oni preskaŭ ĉiam uzas *tre*, sed oni povas uzi *multe*, kiam klare temas pri kvanto aŭ ofteco. Ĉe verboj oni uzas plej ofte *multe*, ĉar temas normale pri kvanto aŭ ofteco, sed oni uzas ankaŭ *tre*, kiam temas pri grado aŭ intenseco:

- *Ĝi estas* **tre** *bona.*
- *Tie troviĝas* **tre** *grandaj domoj.*
- *Mi* **tre** *ŝatas Berlinon. = Mi intense ŝatas Berlinon.*
- *Mi* **tre** *amas ŝin. = Mi intense amas ŝin.*

- *Mi havas* **multe** *da mono.*
- *Ŝi* **multe** *pensis pri tio. = Ŝi longe pensis pri tio.*
- *Kiu* **multe** *parolas, ne* **multe** *faras.*[*PE.1052*]
- *Li* **tre multe** *helpis al mi. Tre* priskribas *multe*. *Multe* priskribas *helpis*.

Por priskribi *pli* kaj *tro* oni uzas *multe*:

- *Ĝi estis* **multe** *pli granda ol antaŭe.*
- *Ĝi fariĝis* **multe** *tro nigra.*

### *Kiel* kaj *tiel*

La tabelvortoj *kiel* kaj *tiel* montras ne nur manieron, sed ankaŭ gradon. Oni uzu ilin en la samaj lokoj, kie oni povus uzi *tre*:

- *Mi estas* **tiel** *forta, kiel vi.*[*FE.10*] Eblas diri: *tre forta*.
- *Estas bone uzadi la vorton “je”* **kiel** *eble pli malofte.*[*FE.29*] Eblas diri: *tre eble*.
- *La nokto estis* **tiel** *malluma, ke ni nenion povis vidi...*[*FE.33*] Eblas diri: *tre malluma*.

### *Kiom* kaj *tiom*

La tabelvortoj *kiom* kaj *tiom* montras kvanton. Oni uzu ilin tie, kie oni povus uzi *multe*:

- *Mi volas* **tiom** *da terpomoj,* **kiom** *mi povas porti.* Oni povas diri: *volas multe* kaj *povas porti multe*.
- *Ŝi* **tiom** *laboris, ke ŝi fariĝis ĉefo de la firmao.* Oni povas diri: *multe laboris*.

Antaŭ *multe* oni ofte preferas *tiom*, ĉar *multe* estas kvanta vorto: *Nun li estis ja riĉa, havante* **tiom** *multe da mono.*[*FA1.3*] Aŭ *...havante tiel multe da mono.* Aŭ *...havante tiom da mono.*

### “*Tiom-kiom*-ismo”

*Kiom* kaj *tiom* estas iafoje uzataj pri grado anstataŭ *kiel* kaj *tiel*, kiam oni volas tre forte emfazi. Sed iuj Esperantistoj uzas sisteme nur *kiom* kaj *tiom* anstataŭ *kiel* kaj *tiel* por montri gradon, kvazaŭ ili ĉiam emfazus, ekz.: **Mi estas tiom forta, kiom vi.** Komparu kun la Fundamenta frazo: *Mi estas tiel forta, kiel vi.*[*FE.10*] Tia “*tiom-kiom*-ismo” estas komplete fremda al la *Fundamento* kaj al la uzado de Zamenhof. Krome *tiom-kiom*-istoj perdas la eblon uzi *tiom* kaj *kiom* por emfazi.